# Ekas klinikaj elprovoj de la vakcina kandidato Soberana 2 kontra? la Covid-19

**Finlay**

Havano, nov 2 (RHK) Dagmar García Rivera, direktorino de esploroj de la Instituto Finlay de Vakcinoj, IFV, informis per Tvitero, ke hodia? komenci?as la fazo I de klinikaj elprovoj de la dua vakcina kandidato kuba, kies nomo estas Soberana 2, sola projekto de kombinita vakcino kontra? la pandemio, post la aprobo de la kuba centro por kontrolo de medikamentoj, CEDMED.

"?io pretas, unu plian fojon, ekzemplo por la mondo kiel la integri?o registaro-sano-scienco povas ?ion atingi, kiam la prioritato estas la popola sano", asertis la sciencistino.

Aliflanke, denove la kuba bioteknologio evidentigas sian forton, kiam la Centro de In?enierado Genetika kaj Bioteknologio (CIGB) prezentis la teknikan dosieron de sia unua vakcina kandidato kontra? la Covid-19 al la centro por kontrolo de medikamentoj (CEDMED).

Tiu ?i estas esenca pa?o en la rajtiga peto de la klinikaj elprovoj en homoj, la? fontoj de la entreprena grupo Biocubafarma.

Oni anka? informis pri tio ke la bazaj rezultoj de la unua kandidato de la instituto Finlay,  Soberana 1 kontra? la malsano, estas esperoplenaj. La fonto precizigis ke ne okazis malfavoraj reagoj a? gravaj sekvoj, sed nun mankas pritaksi la konduton de la elprovo kaj analizi la konduton de la provoj, por scii ?u vere ekzistas antikorpoj, kiel estas atendata.

Eduardo Martínez, prezidanto de Biocubafarma, klarigis ke la skizita strategio por havi “niajn vakcinojn kontra? la Covid-19 bone evoluas. Anta? fino de 2020 ni havos 4 kandidatojn en klinikaj elprovoj.

“En 2021 nia lo?antaro estos imunizita kontra? tiu viruso. La kubanoj povas fidi je siaj sciencistoj, kompromititaj kun la patrolando”, li asertis.

Martínez Díaz esprimis ke multaj sciencistoj laboras forte kaj ekzistas sperto, laboro kaj multaj koroj batantaj forte.“Samkiel ni petas fidon al nia popolo, ni petas ke dum la vakcino ne estu preta, ?iuj devas plenumi la starigitajn regula?ojn en la nuna etapo. Ni ne devas agi malzorgeme”, li asertis.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/238506-ekas-klinikaj-elprovoj-de-la-vakcina-kandidato-soberana-2-kontrau-la-covid-19

**Radio Habana Cuba**